



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Jus aperis n-ro 3/77

de JUNA AMIKO

Abonu 1978

Abonprezo 5,- GM

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 7/78 - 15 febr 1978
Aperas ĉiusemajne

Unua Latin-Amerika Esperanto-Kongreso

Marilia (pp) - De la 17-a ĝis la 22-a de julio 1978 okazos en la brazila urbo Marilia (S.P.) la unua Latin-Amerika Esperanto-Kongreso. El cirkulero de la organizantoj al la esperantistoj en Latin-Ameriko ni citas:

"Ni havas la plezuron sendi aldonite al vi la provizoran programon kaj aliĝilon por la 1-a Latin-Amerika Esperanto-Kongreso en Marilia.

Apartan atenton donas AEA al nia manifestacio, en la kadro de siaj klopodoj por disvastigi Esperanton ekster Eŭropo. Pro tio ni kore invitas vin partopreni kaj ni certigas vin ke, de nia flanko, vi ricevos la maksimuman kunlaboron.

La estrarano de UEA por Landa Agado, s-ino Ursula Grattapaglia, informis nin, ke dum sia vojaĝo tra Latin-Ameriko, ŝi renkontis grandan interesiĝon pri la kongreso kaj ŝi petis nin faciligi, kiel eble plej, la alvenon de alilandaj esperantistoj.

Tial, interkonsente kun la Organiza Komitato en Marilia, ni jam povas garantii, ke la reprezentantoj de nia movado en Latin-Ameriko, ricevos senpagan tranoktadon en Marilia. Krome, kiel indikita en la provizora programo, ili povos profiti ankaŭ pri senpaga veturado de Sao Paulo al Marilia.

Ni jam kontaktis la diversajn ambasadejojn en nia ĉefurbo Brazilio informante pri la kongreso kaj petante ke ili, laŭnecese, helpu la esperantistojn de la koncernaj landoj por efektiviĝi la vojaĝon al Brazilo. Ni invitis la ambasadejojn sendi oficialan reprezentanton al Marilia kaj, tiurilate, ni petas vian eventualan intervenon ĉe via Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, por ke oni donu instrukciojn al la ambasadejo en Brazilio..."

La korespondadreso estas: Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Av. Treze de Maio 47, sobreloja 208, BR-20 000 Rio De Janeiro, Brazilo.

Pri la aktivecoj de SAT kaj SAT-Amikaro

Parizo (pp) - SAT informas pri estontaj renkontiĝoj:

Dimanĉon, la 26-an de februaro 1978, je la 14,30 horo, **KULTURA KUNVENO** de SAT en salono de la "Société des Amis", 114 bis rue de Vaugirard, F-75014 Paris.

Prelegos Petro Louis de la Laborista Universitato de Nancy pri Homoj kaj Kosmo. Projekciado pri la lastaj malkovroj en astronomio.

25-an - 27-an de marto 1978 (Paskon): SAT-Amikara Kongreso en Rennes. Informoj haveblas ĉe la sekretario-kasisto Clément Martin, La Violais, F-35310 Mordelles.

13-an - 15-an de majo 1978 (Pentekosto): Plenaera renkontiĝo en Nemours (arbaro de Fontainebleau) organizita de la pariza SAT-Amikara grupo kun la partopreno de la esperantistoj naturamikaj kaj de la Junul-Pako de SAT. Informoj haveblas ĉe SAT-Amikaro, 67 Avenue Gambetta, Parizo 20.

15-an - 21-an de julio 1978: 51-a Tutmonda Kongreso de SAT en Lectoure. Informoj haveblas ĉe OKK-Esperanto, F-32700 Lectoure (Francio).

Vizito ĉe Triksini Raporto de d-ro J. Kondor - fino

En la belege aranĝitaj ĉambroj mi notis kelkajn rimarkindaĵojn. Sur la muro apud la enirejo al la magazeno pendas dokumento, kiu atestas, ke Hansjörg Kindler el Luksemburgo partoprenis en la seminario por eduko de Cseh-metodaj instruistoj de Esperanto en Ateno 1976 kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Tuj en ĝia najbareco pendas alia reklambildo pri "Jägermeister". Sur tiu ĉi foto oni povas legi: Jägermeister-Spiegel - "Ich trinke Jägermeister, weil die mir nicht glauben wollten, daß ich perfekt Esperanto spreche, wo ich doch 5 Jahre drüben war".....

Sur ŝranko en la angulo mi vidis elŝtopitan malgrandan krokodilon (aĉetitan en la Pulmerkato!), kun ŝildeto en la buŝo: Ne krokodilu!

Belaj porcelanaj tasoĵ kun Esperanto-surskribo estas troveblaj sur la ŝranko, krome Esperanto-cigaretoj el Bulgario kaj Esperanto-vino el Rejnlando-Palatinato. En korbeto amasiĝas alumet-skatoloj, kun Esperanto-surskribo.

Apud la Zamenhof-portreto super la eleganta skribtablo mi ĝoje rimarkis la foton de Papo Pio la X-a kaj tiun de Maksimiliano Kolbe, kiuj ambaŭ favoris Esperanton. Jen la teksto sub la foto de Papo Pio la X-a: "Mi vidas en la lingvo Esperanto valoran ilon por kontaktoj inter kato-likoj en la mondo. Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon." (1906) Kaj la teksto sub la foto de M. Kolbe estas: "'Kavaliro Esperanto' trovas certajn sukcesojn eĉ tie ĉi en Japanujo...." (1931). "Via partopreno en la Esperanto-movado plaĉas al la Senmakula." (1937)

Margene mi rimarkas, ke Triksini en mia ĉeesto facile, rapide kaj elegante parolis telefone kun Varsovio, en la vesperaj horoj, kun s-ino Kalina, kiu nome de polaj instancoj invitis lin al prelegvojaĝo tra Pollando, kombinita per prezentadoj de magiaĵoj kaj pupteatro. La Esperanto-parolado estis perfekte efektivebla, kvankam la distanco inter Luksemburgo kaj Varsovio estas sufiĉe longa....

Per tiu ekstrakto ni finas la raportadon de s-ro d-ro J. Kondor pri vizito ĉe Triksini en Luksemburgo. Ni kore dankas al la aŭtoro!

Trilanda renkontiĝo en Aachen

Aachen (pp) - De la 29.4. ĝis 1.5.78 okazos Trilanda Renkontiĝo en Aachen. La provizora programo antaŭvidas jenajn erojn:

Sabaton, 29.4.78: Lumbildparolado pri la UEA-kongreso en Reykjavik. Oficiala akcepto en la urbodomo. Teatraĵo "La Hipnoto" de polaj geaktoroj. Internacia balo.

Dimanĉon, 30.4.78: Diservo fare de pastro Kindler. Prelego aŭ Rond-tabla Diskutado pri la temo: "Aktualaj problemoj de la eŭropa integriĝo". Vespere: Triksini, la majstro kun la blua ŝtono sorĉas por vi!"

Lundon, 1.5.78: Laborkunsido. Pupteatraĵo aŭ io alia. Prelego kun diskutado: "La funkciado de Amnestio Internacia".

Informojn pri la Trilanda Renkontiĝo kaj aliĝojn akceptas: S-ro Paul Firmenich, Jahnstr. 5, D-5190 Stolberg, F R Germanio.

Ĉu vi serĉas por komencanto aŭ progresinto aŭ por vi mem facile skribitan kaj kompreneblan legaĵon, tiam menu tuĵ

10 diversajn numerojn de JUNA AMIKO

Prezo estas nur 10,- GM. Menu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

Novaj aperaĵoj

Slovaka Antologio Elekto de Josef Velky, tradukis ĝin 7 diversaj tradukantoj, elekto el la 9-a jarcento ĝis hodiaŭ.

15 x 20,9 cm, bind., 538 p., tre bona kaj bela libro! Prezo 24,90 GM

Sur la kovrilo de la libro oni povas legi:

"Ni prezentas al la monda publiko buntan elekton el la literaturaj valoraĵoj de la slovaka nacio, kiu la unuan fojon en la historio sin anoncis per skribita vorto jam en la 9-a jarcento de nia epoko. Ekde tiu tempo la literatura aktivado de ĝiaj aĵoj progresas tra humanismo, baroko, klasicismo kaj romantismo, kunligante ilin kun realismo kaj moderna nuntempo, formetante tiel unuecan, sed tamen interese varian tuton.

La libro donas trarigardon pri la historio de la slovaka literaturo kiel parto de pli larĝa kultura kunligo. Ĝi observas la literaturan evoluon ekde la plej malnovaj tempoj ĝis nun. La unuopajn epokojn de la literaturo reprezentas poezio kaj arta prozo en Esperanta traduko.

Slovaka antologio enhavas 92 ĉapitrojn, kiuj - kvazaŭ floroj - kreas allogan bukedon. Akceptu do, kara leganto, tiun ĉi florbukedon, kiu ĝojigu vian mendon kaj montru al vi la pasintajn kaj nunajn strebadojn de nacio vivanta en la koro de l' Eŭropo."

Mendu la libron ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, P&k. Nürnberg 819 56-819.

JUNA AMIKO aperis ĵus la 3-a numero de 1977. Per tio la jarkolekto 1977 estas kompleta. Entute ĝis nun aperis 12 numeroj.

Ludwig Pickel, Libroservo, 8500 Nürnberg, akceptas la abonkotizon por la nova jaro 1978. La abonkotizo estas 5,-- GM. Jare aperas 3 numeroj.

Oni ankaŭ povas mendi la jam aperintajn numerojn. Vidu p. 2!

Kial en Ĉinio ne troviĝas inflacio de Peng Guanghi. Eldono de Fremdlingva Eldonejo Pekino, 1977

13 x 18,5 cm, broŝ., 52 p. (4-Es-1392P) prezo -,80 GM

La supraĵojn vi povas mendi ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg, P&k. Nürnberg 819 56-851

Esperanto en Aachen

Aachen (pp) - Esperanto-grupo informas: Post longjaraj vanaj klopodoj nia Esperanto-grupo finfine sukcesis enpenetri kun sia lingvo en la studprogramo de la ĉi-tiea popolaltlernejo. Nia grupmembro Uwe-Joachim Moritz gvidos ekde venonta septembro 1978 Esperanto-kurson. La sukceso de ĉi tiu kurso dependos de la nombro de la partoprenantoj.

Kvankam nia urbo estas famkonata kiel universitata urbo (entute 25 666 germanaj kaj eksterlandaj gestudentoj) mankas ĝis nun fruktoporta tereno por nia lingvo. Ĉefe la teknikaj studentoj respondas rilate Esperanton: "Por lerni ĉi tiun lingvon ni ne havas tempon. Ekster multpeza teknika studado ni bezonas en la nuna tempo por nia profesio sur la lingva fako aŭ la anglan aŭ la germanan, eble ankaŭ la francan kaj rusan lingvojn."

Do ĝis nun entute nefavora preteco por nia lingvo! Kion ni faru por ne malsukcesi kun nia estonta Esperanto-kurso? Ĉar nia grupo estas je la vico por organizi la sekvontan Trilandan Renkontiĝon, ni pripensis organizi eksterkutiman renkontiĝon por trovi pli grandan reeĥon en la ĉi-tiea publiko.

Kion ni bezonas por nia venonta renkontiĝo, tio estas pli granda amaso de esperantistoj kaj de esperantistaj eminentuloj el proksimeco kaj malproksimeco. Ni nepre bezonas vian helpon! La anoncon pri la renkontiĝo legu sur p. 2!

Heide Apolloner, Biografio

La Esperanto-Redakcio de ORF-Vieno la 11/12 de februaro elsendis sur mallonga ondo jenan biografion pri Heide Apolloner:

"Heide Apolloner naskiĝis en Feldkirchen, Karintio, en 1931. Dum sia juneco ŝi multe revis pri vojaĝado en aliaj landoj kaj post la fino de la milito ŝi malpacience atendis sian unuan pasporton. 18-jara ŝi komencis preskaŭ dekjaran vagadon tra okcidenta Eŭropo. Ĉefe ŝi restis kaj laboris en Anglujo, Germanujo kaj Francujo. Sekvis diversaj studoj kaj ekzamenoj kaj ekde la jaro 1964 ŝi instruas la anglan lingvon en Viena lernejo. La vagademo devas dormeti nun - almenaŭ dum la lerneja jaro.

S-ino Apolloner ŝatas sian profesion kiun ŝi rigardas kiel nur unu el multaj ebloj de komunikado kun junaj homoj.

Jam antaŭ du jardekoj la aŭtorino de NIA ORIGINALA PROZO estis plurfoje atentigita pri Esperanto sed ĉiam ŝi nur priridis ĝin. Unu el siaj argumentoj kontraŭ la internacia lingvo estis, ke lingvo sen propra, nature evoluanta literaturo neniam povus interesi ŝin.

Nun ŝi diras: "Tamen mi ne eskapis la justan punon por tiu senbaza juĝo. Kiam, en 1972 mi vizitis miajn unuajn lecionojn de 'nia lingvo' en la Pedagogia Instituto de Vieno, mi tuj estis kaptita per la originala Esperanta literaturo kaj nun mi nek povas nek volas liberigi min de tiu kaptiteco. La 'puno', fakte ne estis pli terura ol legi kelkcentojn de Esperantaj libroj kaj iom pripensi kaj priskribi ilin. Cetere, la helpemaj sinjoroj de la Internacia Esperanto Muzeo Wien multe faciligis mian taskon eĉ tiam, kiam mi preskaŭ supertaksis ilian paciencon serĉante librojn kiuj evidente ne ekzistas."

Heide Apolloner nun preparas la duan eldonon de NIA ORIGINALA PROZO kaj intencas inkludi la prozajn teatraĵojn kaj la novaperantajn librojn ekde 1974. Ŝia celo estas la kreado de plejeble kompleta, ĝisdata kaj fidebla gvidilo tra la originala Esperanta prozo.

La verkado kaj eldonado de originalaĵoj ja ĝojige plivigliĝis dum la du - tri lastaj jaroj. Oni povas do konkludi: La esperantistoj verkas kaj legas - la lingvo vivas!

Esperanto en Radio

Varsovio. Ĉu manko de personoj aŭ aliaj motivoj kaŭzas la foreston de pli da Esperanto-temaj programoj en la Varsoviaj elsendoj? Vane ĝis nun ni atendis ekz. "Trarigardon de la Esperanta gazetaro". - La politikaj temoj, kiuj redonas la polan starpunkton, kaj la informoj ja ĉiam estas aktualaj kaj por politike interesita homo interesaj. Tamen la informoj pri Esperanto ne ĉiam estas aktualaj kaj freŝdataj. Novaĵoj el decembro kaj kiujn oni parte jam povis legi en revuoj, certe en februaro ne plu estas freŝdataj. Kaj kial Varsovio post la Moskva elsendo pri Esperanto silentis pri la fakta elsendo kaj ĝia enhavo? Ĉu vere neniu esperantisto en Varsovio aŭskultis Radion Moskvon, kiu estus povinta raporti al Varsovio? Certe, ne estas tasko de radiostacioj raporti pri aliaj elsendoj. Okazas ja konkurencado kaj rivelado inter la unuopaj stacioj. Tamen la Moskvaj elsendoj pri Esperanto vere estis sensaciaj, ke ili meritis la raportadon de ĉiuj Esperanto-medioj.

Relative malmulte kaj malofte oni nun aŭdas ion pri CED. Estis pro tio do bone, ke la Esperanto-Ekspreso disaŭdigis intervjuon kun d-ro Ulrich Lins. La "Panoramo de internaciaj eventoj" raportis pri la Proksima Oriento, pri la Korno de Afriko kaj pri Eŭropo inkl. de Beogrado.

Bone aŭdeblis en Nürnberg Radio Vatikano, ORF Vieno kaj la Svisa Kurt-onda Servo. Pri la literaturo de la romancoj parolis d-ro A. Baur kaj pri la historio de SES CL. Gacond. Tre interesa de ORF Vieno estis la biografio de Heide Apolloner, kiun ni supre publikigas. Interesa ĉiam estas la programo de Radio Vatikano.